laŭanalogiaj li klopodas fari la ideon pri 4a dimensio klara, miaopinie ne ĉiam efike; krome la multaj rezonadoj iom tedas kaj kelkfoje estas pridubindaj (ekz. la klopodo komprenigi 4-dimensian spacon per pristudado de 3-dimensia vektoro kun kompleksaj komponantoj: tie oni bezonus ne 4-, sed 6-dimensian spacon). Ankaŭ pri simetrio li iom traktas, kaj pri la ideoj de la okultistoj pri la temo.

Li ankaŭ pritraktas la demandon ĉu la 4-dimensia spaco estas jes aŭ ne reala, kaj prie citas multajn aliajn aŭtorojn diversnaciajn, „por"- kaj „kontraŭ"-ulojn. Li mallonge diskutas spacon de pli ol 4 dimensioj kaj la ideon pri la mondo kiel 4-dimensia „tempo-spaco" (Einstein, Minkovskij).

Tre detale li pritraktas la ideojn (en ties libro „La kvara dimensio") de rusa prof. P. D. Uspenskij, kiu serĉas „la 4-an dimension" ne *apud* nia spaco laŭ nekonata (la 4a-dimensia) direkto, sed *interne de* ni mem kaj ĉiuj fizikaj korpoj, en la sfero de la infinitezimalo. Tiuj kaj aliaj rezonadoj de Uspenskij, kiujn la aŭtoro re-donas, estas por mi malklaraj, nekompreneblaj, kaj pro tio mi ne aŭdacas diri iom pri ili. Uspenskij pritraktas i.a. ankaŭ psikajn radiojn aŭ emanaĵojn, la simetrion de multaj vivaj (folioj) kaj senvivaj (kristaloj) aĵoj, la laŭprincipan unuigeblecon de la sciencaro.

La aŭtoro pritraktas la rilaton inter 4a dimensio kaj religiaj mirakloj. Multaj tiaj mirakloj estus klarigeblaj per hipotezo pri la ekzisto de 4a dimensio (ekz. subita apero aŭ malapero de personoj); tiel la pruvita realeco de tiaj mirakloj (tiurilate mi, senreligiulo, konfesu ke mi estas tre skeptika!) estus argumento por la ekzisto de 4-dimensia spaco.

Fine li traktas la verketon de rusa inĝeniero K. N. Platunov („Spaco de kvara dimensio", Bruselo 1920), kiu cetere, pri kelkaj bazaj aksiomoj de la 4-dimensia geometrio, miaopinie faras dubindajn asertojn, kaj donas tute malklaran rimedon („metodo de rotacia movo") por helpi la imagadon de „bikvadrato", kaj ankaŭ diras iom pri mekaniko kaj energio en 4-dimensia spaco.

Miaopinie la libro estas en sia nuna formo ne taŭga por eldonado. Ĝi enhavas multajn malklaraĵojn kaj malĝustaĵojn; multo ankaŭ estus ĝisdatigenda (la manuskripto finskribiĝis en 1931). Praktika kontraŭaĵo estas ke al aliaj aŭtoroj ofte estas malklare, nekomplete referencate, tiel ke oni ne povus ekserĉi la koncernajn verkojn. Ekz. de la libro de Uspenskij, tiom detale pritraktata, ne estas menciataj aperdato kaj -loko.

C. A. ten Seldam.

539

D-ro C. A. ten Seldam: *„Energies and Polarizabilities of Compressed Atoms"* eldonita por la Boyle-fondaĵo far van Gorcum & Comp. N.V., Assen, Nederlando. Prezo 8,50 guld. ned. — Al ĉi tiu 75-paĝa anglalingva disertaĵo estas aldonita 7-paĝa esperantlingva resumo, identa kun la unua ĉapitra, kaj iom pli ol dupaĝa nederlandlingva resumo.



## „MILITO KONTRAŬ LA MIZERO. PLANO POR MOND-DISVOLVO".

(Angle: „WAR ON WANT: A PLAN FOR WORLD DEVELOPMENT") Havebla nur ĉe la „Association for World Peace", 14 Henrietta Street, London, W.C. 2. Prezo: unu ŝilingo. Paĝoj 96. 1952.

Oni klarigis en enkonduko, ke ĉi tiu asocio estiĝis rezulte de letero (verkita de S-ro Victor Gollancz), kiu aperis en la Manchester Guardian de la 12-a de Februaro, 1951. En tiu letero li atentigis, ke nuntempe la homaron kontraŭstaras du grandaj minacoj — la milito kaj la malsato —, kaj ke inter la du ekzistas intima kunligo.

La asocio starigis komitaton por esplori la duan minacon, kaj ĉi tiu broŝuro estas ĝia raporto.

La fundamenta fakto, kiun konstatis la raportintoj kiel elirpunkton de siaj esploroj, estis, ke du trionoj de la homoj nuntempe loĝantaj sur la tero, vivas en mizero, kaj mortas en pli juna aĝo, ol ili mortus, se ili povus pasigi la vivon en kontentigaj kondiĉoj. Tre multaj mortas dum la infanaĝo.

Malkrom ĉe la plej riĉaj klasoj tia aferstato ĉiam ekzistis, sed nuntempe la minaco terure pligrandiĝis pro la kresko de la popolnombro, kaj pro la elĉerpiĝo aŭ tuta perdiĝo de la plej produkta grundo. Sed samtempe pligrandiĝis la espero, ke tiu aferstato ne estas neevitebla, ĉar kontraŭrimedoj jam estas eltrovitaj.

La sorto de la homaro dependas de tio, ĉu ĝi estos sufiĉe saĝa por ilin uzi. Kiel diris la lastatempe mortinta verkisto, H. G. Wells, nuntempe ekzistas konkurado inter la edukado kaj la pereo.

Nuntempe la loĝantaro de la mondo nombras ĉirkaŭ 2 200 000 000, kaj multaj ankoraŭ vivas, kiuj memoras la tempon, kiam oni taksis la nombron kiel 1600 000 000. Oni kredas, ke ĝi preskaŭ duobliĝos antaŭ la fino de la nuna jarcento. En ĉiuj du sekundoj naskiĝas meznombre tri infanoj. Sed la produktado de la nutraĵoj nur malmulte pligrandiĝis post la jaro 1939; tria mondmilito, precipe se ĝi okazus en sud-orienta Azio, kredeble eĉ malpligrandigus ĝin.

Socialistoj ofte atentigis, ke en ĉiu nacio granda proporcio de la nacia enspezo estas ricevata de malplimulto de la loĝantaro. Simile statistikoj publikigitaj de la Unuiĝitaj Nacioj montras la saman aferstaton inter nacioj, — pli ol duono de la loĝantaro de la tero, konsistiganta 15 naciojn, ricevas 9 % de la tuta enspezo. En tio kuŝas daŭra eblo de malpaco.

Nuntempe kontraŭstaras la homaron minaco de milito inter la du duonoj de la mondo, kiuj akceptas aŭ la okcident-demokratian, aŭ la komunisman „ideologion". Sed la raporto atentigas pri eĉ pli profunda danĝero: „eĉ se ĉiuj komunistoj en unu sola nokto konvertiĝus al niaj plej bonaj ideoj pri la demokratio, la minaco kontraŭ la mondpaco ankoraŭ restos, kaj pli aŭ malpli baldaŭ pliintensiĝos, se daŭros la nuntempa aferstato, ĉe kiu unu triono de la popoloj de la mondo vivas en komforto, kaj du trionoj vivas en mizero."

Tial estas la devo de la pli prosperaj nacioj helpi la malpli prosperajn, precipe liverante al ili rimedojn por la pli efika kaj inteligenta ekspluatado de la grundo, kiel ankaŭ donante al ili konsilojn pri tio. Tion ankaŭ motivas konsideroj pri propra profito. Sed la plej urĝa motivo estas, ke ĝi estas nia devo, ĉu ĝi estas profita aŭ ne.

Tio estas la fame konata „kvara punkto" de la inaŭgura parolado de la prezidanto T r u m a n en Januaro 1949 (represita en ĉi tiu broŝuro, kiel aldono A). Sufiĉas citi nur unu frazon: „La malnova imperialismo — la ekspluatado de fremduloj por la profito — ne trovas lokon en niaj planoj."

Alia aldono prezentas resumon pri la U.N. kaj ĝiaj specialaj helpaj organizoj, *„specialized agencies"* — *I.L.O., W.H.O., F.A.O.,* k.t.p.

En alia parto de la raporto oni priskribas la Britajn leĝojn pri la kolonia disvolvado faritajn en 1929 kaj en 1948, kiel ankaŭ la „planon de Kolombo", kiu rezultis el kongreso en tiu loko, la ĉefurbo de Cejlono.

Se oni pligrandigas la produktadon de la nutraĵoj la unua efiko estas pligrandiĝo de la nombro de la naskiĝoj kaj malpligrandiĝo de la nombro de la mortoj; tio nuligus la profiton, (kiel atentigis la pastro M a l t h u s en la jaro 1790), se ne okazus kiel antaŭe io, kio malhelpus la naturan tendencon. En ĉiu okazo ne estas kredeble, ke varoj el primitivaj landoj ĉiam estos tiel malkaraj, kiel ili estas nuntempe.

Estas vere, ke laŭ D-ro J. d e C a s t r o, — brazilano, kiu estas fame konata pro sia verko „La Geografio kaj la Malsato", defendas la opinion, ke ju pli granda la proporcio de la proteino en la dieto, des malpli estas la nombro de la naskiĝoj. La raportantoj dubas pri tio, sed ili konfesas, ke sociaj ŝanĝoj eble efikus same.

Sed tia dua efiko aperus, se iam, nur post longa tempo, kaj nenio estas certa krom tio ke, (se oni ne baldaŭ trovos kontraŭrimedon), nepre okazos tutmonda malsato, antaŭ ol formortos la nuntempa generacio, — eble antaŭ 1960.

Tial la raportantoj proponas, ke la nacioj dediĉu por la monddisvolvo, t.e. por la pli bona kulturado de la grundo, fiksan proporcion, (eble 10 %), de la tuta elspezo en ĉiuj landoj por la militaj celoj.

Oni ne prokrastu! T.L.C.B.

Noto de la Redaktoro: La aserto de d-ro de Castro kredeble estas vera, sed sendube ne ekzistas senpera rilato inter proteinriĉa dieto kaj malmulteco de infanoj. Evidente la rekta kaŭzo por la multekosta proteinriĉa dieto estas **la** pligranda prospero, kaj pere de la ĝin akompananta pli bona instruiteco ĝi ankaŭ kaŭzas la malmultecon de la naskoj. Determina por la nombro de la naskoj estas la kulturo.

Tamen, tre proteinriĉaj dietoj havus rektajn efikojn. Oni trovis ke ratoj kaj katoj nutrataj per tre proteinriĉaj nutraĵoj al kiuj mankis, tute aŭ preskaŭ tute, karbonhidratoj kaj grasoj, 1e kreskis malpli ol ordinare, kaj 2e ne produktis idojn (vidu J. of Physiology, **56** [1922] 413).



11/14

M a r t i n u s: **„La Homaro kaj la Mondbildo"**, el la dana originalo *„Menneskeheden og Verdensbilledet"* tradukis C. Graversen, kaj kontrolis la Literatura Komitato de SAT. Eldono de la Spirit-scienca Instituto de Martinus, Esperanto-sekcio, Mariensdalsvej 94—96, Kopenhago F., 1953. Kun antaŭparolo de D-ro Paul Brunton. 124 paĝoj, formato 188 × 124 mm², bindita en plaĉa verda tola kovrilo, kun la ĉi-apuda simbolo en oro. Prezo 6,50 d.kr.

Mi ne scias ĉu estas „hazardo" ke nur kelkajn tagojn antaŭ ol mi ricevis por recenzo ĉi tiun malgrandan libron, mi legis nederlandan libron de evidente kun Martinus parenca animo, Profesoro R. W. Broekman, kies libro „Eterno kaj Infinito, — Sintezo inter Kredo kaj Scienco" estas la rezulto de multjara serĉado kaj „filozofia cerbumado". Martinus kaj Broekman ambaŭ trovis ke la moderna scienco ne kontentigas, ĉar ĝi ne donas, nek povos doni respondon pri la enigmo de la vivo. La dogmoj de la eklezioj ja donas respondon, sed dogmoj ne kontentigas raciulojn. Kaj jen, ambaŭ aŭtoroj provas doni solvon, respondon en formo akceptebla por modernaj, racie(?) pensantaj homoj. Kaj tamen, kiel diferencas tiuj respondoj, almenaŭ forme!

Profesoro Broekman uzas la metodon de la analogio: ĉio ekzistanta strebas al pluekzistado, al moviĝado tra la tempo, kaj ne nur tra la tempo, ankaŭ tra la spaco, tiel per kresko, kiel per translokiĝo. Kresko, tamen estas limigita. Venas stadio kie plua kresko sen aliformiĝo, sen forofero de malnova formo favore al novaj formoj, ne plu eblas. Tiam la periodon de la sinnutrado, sekvas la periodo de la kreo, de genero kaj nasko, kreo kiu ĉiam estas la rezulto de streĉoj inter kontraŭaj polusoj vireca kaj ineca. Profesoro Broekman serĉis kaj trovis analogiojn ĉe tio kion ni ordinare nomas la mondo de la senvivaĵoj. Sed la afero ne finiĝas en la materia mondo: post la ŝtupo de la seksa idigo, la plej alta formo de moviĝo en tempo kaj spaco interne de la materia mondo, venas la mondo de la spirito kaj intelekto, kiujn la homo jam junaĝe komencas nutri. Ĉe kelkaj individuoj, ĉe kiuj disvolviĝas spiritaj streĉoj kaj tensioj inter vireca kaj ineca polusoj, post la stadio de la spirita nutriĝo sekvas la stadio de la spirita kreo. Sed ankaŭ per tio la plej alta stadio ne estas atingita: post la intelekto, kies sidejo estas la kapo, la cerbo, ankoraŭ sekvas la amo, kies sidejo estas la koro. Ni ne ploru pri morto kaj fizika degenero, se tio estas simptomo de evoluo al pli alta stadio. Tiel, proksimume, rezonas profesoro Broekman.

La metodo de la analogio, kvankam ĝi strikte nenion pruvas, tamen havas la meriton ke ĝi faciligas komprenadon al tiuj, kiuj konas la faktojn kiuj servas por komparo. Martinus ne uzas tiun metodon. Se Profesoro Adrian (vidu p. 4) diras ke „la biologiisto celas al kompreno pri la vivo", Martinus respondas ke per la metodoj de la biologio, de la materia scienco, per la metodoj de mezurado, pesado, kaj sekcado, per la esploro de la kreitaĵoj kaj la fenomenoj, oni neniam solvos la misteron de la vivo, de la kreinto, kiu